# *Fini?as konferenco pri hemisferaj studoj kaj Usono.*




Havano, 6 jun (RHK) La konferenco pri hemisferaj studoj kaj Usono fini?as hodia? en tiu ?i urbo post dutaga sesio kaj debatoj pri regionaj politikaj procezoj kaj publikaj strategioj de la norda lando.

La akademianoj ?eestantaj pritraktas temojn rilatajn al la ekstera politiko kaj la rilatoj Kubo-Usono, samkiel la gvidliniojn de la Blanka Domo koncerne al latinamerikaj kaj karibaj landoj, raportas la informagentejo Prensa Latina.

Dum la komenca prelego, la doktorino Francisca López efektivigis kronologian analizon pri la rilatoj inter amba? landoj, kun emfazo en la aneksismaj interesoj de la usona registaro rilate al la insulo.

Oni debatis pri la intervenemo de Va?ingtono en la kontinento per la impulso kaj subteno al malstabiligaj strategioj por faligi la progresistajn registarojn kun la celo starigi administraciojn favorajn al iliaj interesoj.

La evento sesias en la havana universitato kaj ?in organizas la centro pri hemisferaj studoj kaj pri Usono kaj la katedro Nia Ameriko.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/163918-finigas-konferenco-pri-hemisferaj-studoj-kaj-usono

# Radio Habana Cuba